



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 4  
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
30-a (37-a) jaro  
Monata

## Norvega Esperantista Ligo Jarraporto 1963

### ESTRADO

*La Liga Konsilantaro* konsistis de la jarkomenciĝo el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz  
Vicprezidanto: Ludvig Anjer  
Generala sekretario: Vidar Vik  
Sekretario: Gerd Jæger Pettersen  
Kasisto: Karl Ekhaugen  
Estraranoj: Olav Rygg, Jan Ekhaugen  
Anstataŭantoj: Harda Danielsen,  
Alfred Skyberg, Kjell Gustavsen

Ceteraj Konsilantaranoj:  
Johannes Flodmo, Mo i Rana  
Trygve Kvalvåg, Stavanger  
Ragnv. Rian, Trondhejmo  
Johan H. Rosbach, Sarpsborg

Revizoroj: Bj. Ottesen, Ruth Karlson

La sekretarioj kaj revizoroj ne deziris reelekton. La Landa Kunveno en Stavanger 2.—3. de junio elektis jenan novan Ligan Konsilantaron:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz  
Vicprezidanto: Ludvig Anjer  
Generala sekretario: Tom Arbo Høeg  
Sekretario: Signe Haug

Kasisto: Karl Ekhaugen  
Estraranoj: Olav Rygg, Jan Ekhaugen  
Anstataŭantoj: Harda Danielsen,  
Alfred Skyberg, Kjell Gustavsen  
Ceteraj Konsilantaranoj:  
Johannes Flodmo, Mo i Rana  
Fin Hole, Mandal  
Trygve Kvalvåg, Stavanger  
Ragnv. Rian, Trondhejmo  
Johan H. Rosbach, Sarpsborg  
Rev.: John Selbekk, Karin Sandberg.

*Landa Kunveno* okazis 2.—3. de junio en Stavanger, aranĝita de Stavanger Esperantoklubb. - La kunveno i. a. akceptis laborplanon por NEL, starigis Financan Komisionon, decidis ke la minimuma kapitalo de la Propaganda Fondaĵo estu kr. 5000,— kaj akceptis rezolucion al la norvegaj esperantistaj instruistoj kaj lektoroj kun propono ke ili klopodu akiri permeson por eksperimenta instruado de Esperanto. Plie la kunveno diskutis la laboron inter la junularo kaj la enhavon de Norvega Esperantisto.

(daŭr. p. 44)

## POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

Red.: H. Fridén

(Ni nun faru saltegon ĝis Nova Gvineo, la granda insulo, ankoraŭ ne-tuŝita de la civilizacio. En tiu insulo oni parolas 400 diversajn lingvojn, sed interkompreniĝas per «Pidgin English» aŭ *Pisino*, helplingvo uzata en Melanezio kaj cetere en la granda Pacifiko. — La sekvanta fragmento estas prenita el la libro «Kanakano el Kananam» de Kenneth G. Linton, kaj havebla ĉe Esperantoforlaget.)

*Vane sed ne senfrukte.*

Kvankam ĉi tiuj detaloj sendube trapasis mian menson dum ono de momento, ŝajnis tre longa tempo, antaŭ ol mi sufiĉe min regis por rideti kaj murmuri, «Bonan tagon!»

«Gudei Masta!» li respondis pisine, ne reciprokante mian rideton. «Bolong wonom yu kam?»

Ne scipovante la lingvon, mi tute ne komprenis, ke li efektive diris, «Bonan tagon, Mastro! Kial vi venis?» Do mi angle anoncis, «Mi estas aŭstraliana aersoldato. Mi deziras riĝardi vian vilaĝon.»

«Mi no save» (Mi ne komprenas), li respondis pisine, ne moviĝante kaj ne ŝanĝante la fiksitan esprimon sur la vizaĝo.

Konstatante, ke mi tre bone progresas, mi malbutonumis la bluan poŝon, el kiu mi prenis paketon da cigaredoj. Denove penante rideti, mi ĝin proponis al li kun la invito, «Pre-nu cigaredon!»

La severa esprimo sur lia vizaĝo ŝajnis iomete moliĝi, dum li prenis la paketon antaŭ ol eltiri cigaredon, kiun li metis en la buŝon. Puŝinte la preskaŭ plenan paketon malantaŭ la antaŭtukon ĉe sia talio, li kliniĝis por bruligi la enbuŝan cigaredon ĉe la alumeto, kiun mi ĵus ekbruligis.

Sen plua vorto li turniĝis sur la kalkano, kaj, suprenirinte la ŝtuparon, eniris la domon. Li tuj revenis, portante grandan faskon da bananoj, kiun li enmanigis al mi kun la vortoj, «Em i bolong yu» (rekta traduko: Ilin li aparteni vi).

Mi ne komprenis la vortojn, sed la situacion mi bone komprenis. Li kredis, ke mi donacis al li la cigaredojn, do li rekompencis min per «donaco pro donaco». Mi poste eksciis, ke li devas tion fari laŭ indiĝena kutimo.

«Yu ken kisim mit i kam?» (Vi povas havigi viando li veni?) (Ĉu vi povas havigi al ni viandon?) li demandis kun stranga lumo en la okuloj. Mi poste sciis, ke tiu lumo estis signo de la espero en la koro.

«Mipela i nogat mit nau. Japanman i kilim dai pinis ol pig. Supos yu ken kisim mit i kam, mipela i ken kisim planti banana na popo i kam long yu.» Post tio li avida atendis mian respondon.

Se mi estus nur kompreninta la lingvon, mi sciis, ke li diris, «Mi fella li ne havas viandon nun. Japanviro li mortigi lin morti finis ĉiuj porkoj. Supoz' vi povas havigi lin viandon li veni, mifella li povas doni lin plantojn bananajn kaj papajon li veni al vi.»

(daŭr. p. 52)

## HELSINGØR

invitas vin pasigi ferian semajnon en La internacia Altlernejo 19.—26. julio inter samideanoj el multaj diversaj landoj. — Petu senpagan prospekton

ĉe **L. FRIIS**  
Ingemannsvej 9  
Åbyhøj, Danlando

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo  
Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-  
lando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj:  $\frac{1}{1}$  paĝo kr. 150,—  
 $\frac{1}{2}$  p. kr. 75,—,  $\frac{1}{4}$  p. kr. 38,—  
 $\frac{1}{8}$  p. kr. 19,—.

## La Jarraporto

pleksan jarraporton de Norvega Esperantista Ligo. Ĝi estas prezentita en nia gazeto, por ke ĉiu norvega esperantisto havu la okazon legi kaj studi ĝin.

La jarraporto povas doni al vi ideon pri la vasta laboro, kiun faras kaj administras NEL, pere de siaj relative tre malmultaj gvidantoj. La samaj nomoj reaperas plurfoje en ĉiu jarraporto kaj reaperas jaron post jaro.

Estas dece, ke la norvega esperantistaro dankas la Estraron kaj la gvidantojn de la diversaj sekcioj por la grava kaj sindona laboro farita en la pasinta jaro, kaj ni jen permesas al ni transdoni tiun dankon en la nomo de ĉiu norvega esperantisto.

## Sciigoj de N.E.L.

La kontorfondado. En 1963 ni denove ricevis malpli multajn donacojn por la kontorfondado, kiu ĉiam estis tre valora helpo por la Ligo. Ni permesas al ni denove atentigi la membrojn pri tiu grava konto por donacoj al nia laboro.

La Propaganda Fondaĵo. Samtempe ni memorigas ankaŭ pri la tre grava Propaganda Fondaĵo. Kvankam ĝi nun atingis la laŭstatute minimuman kapitalon, tiel ke ĝi povos ekesti utila, estas klare ke ĵu pli granda fariĝos la fondaĵo, des pli utila ĝi estos.

Taskotabelo por la kluboj. — Majo: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La Estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj planas kursojn.

Raporto de la Liga Estraro pri la 1a jarkvarono. Okazis 2 estrarkunvenoj. Oni elsendis 1 cirkuleron al kluboj kaj rektaj membroj kaj 1 nur al la kluboj. Oni ellaboris kaj aprobis jarraporton 1963, jarkalkulojn 1963 kaj budĝeton 1964. Oni decidis inviti Nordlandan Esperanto-Kongreson al Oslo en junio 1965. Oni aprobis s.inon Astrid Mansrud kiel novan prezidanton de la Faksekcio de Instruistoj. Oni reelektis Ludvig Anjer Komitato A de UEA por la venonta periodo. Pro ekonomiaj kaŭzoj oni decidis ankaŭ en 1964 redukti n.ron 3 de Norvega Esperantisto al 8 paĝoj kaj kunigi n.rojn 5 kaj 6 en unu duoblan numeron 16-paĝan. Oni decidis enketi ĉe la kluboj kaj rektaj membroj ĉu ili estas pretaj kunlabori en la kampanjo proponita de UEA por vasta antaŭenigo de Esperanto en kombino kun la «Jaro de Internacia Kunlaboro» de UNESKO en 1965. Oni klopodas reaperigi la informgazeton «Esperanto-nytt».

La Estraro.

# Jarraporto 1963

(daŭr. de 1. paĝo)

## ADMINISTRADO

*Estrarkunvenoj.* Okazis 7 estrarkunvenoj (6 en 1962), kaj oni protokolis 93 punktojn (81 en 1962).

*Cirkuleroj.* La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 5 ordinarajn cirkulerojn, la laborplanon de NEL kaj enketon pri Norv. Esperantisto. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. Tial nur 1 el la cirkuleroj estis sendata ankaŭ al la rektaj membroj.

*La oficejon* estris la prezidanto kune kun la ĝenerala sekretario. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laborojn dividis inter si la estraranoj; sed dum la Ligo kaj Eldonejo Esperanto A/S kune disponas ĉambregon de nur 6 m<sup>2</sup>, la laboroj ne povas esti farataj tute kontentige. La Ligo kaj la Eldonejo havas komunan telefonon.

*La Oficeja Fondaĵo* dum la jaro donace ricevis kr. 147,40 (en 1962 kr. 381,35). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

*La Financa Komisiono*, konsistanta el John Berggreen (prezid.) Kirsten Ek, Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj) faris grandan preparlaboron kaj esperas ke rezultatoj aperos en 1964.

## DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

*Distriktoj.* Neniu nova distrikta organizaĵo fondiĝis. Nordlanda Distrikto, Okcidenta Distrikto kaj Orienta Distrikto bone laboris, Meza Distrikto estis iom malpli aktiva; la distriktoj okazigis jarkunvenojn. Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

*Kluboj kaj membroj.* Je la jarfino 1962 NEL havis 22 aliĝintajn klubojn. Neniu nova klubo fondiĝis, kaj neniu klubo malfondiĝis. Je la jarfino 1963 NEL sekve havis 22 klubojn.

## Membrostatistiko:

Bergen, La Esp.klubo de, Ok.D...	36
Bodø Esperantoklubb, N.D.....	11
Gjøvik, Klubo Esp.-a de, Or.D...	11
Halden, Ascendo, Or.D. ....	13
Hamar, La Norda Stelo, Or.D. . .	17
Harstad, Noktomeza Suno, NNED	7
Haugesund, Mara Vento, Ok.D. . .	46
Horten, La Ponto, Or.D. ....	11
Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok.	6
Kristiansands Esperantoklubb . . .	17
Løten, La tri verdaj steloj de, Or.	12
Mandal, Esperantoklubo en . . . . .	8
Mo, La Esperantoklubo de, N.D... .	5
Odda, La Glaciario, Ok.D. ....	5
Oslo, Klubo Esperantista en, Ok.	143
Sarpsborg, La Urso, Or.D. ....	16
Sauda Esperantoklubb, Ok.D.....	15
Skorovatn, Skorovas Esp.kl., M.D.	9
Skudeneshavn, La Granda Ideo, Ok.	8
Stavanger Esperantoklubb, Ok.D.	12
Tromsø, La Norda Lumo, NNED.. .	5
Trondhejmo, Grupo Esp.-a, M.D.	43

Sumo: 456

Rekte aliĝintaj membroj . . . . .	143
Subtenantaj membroj . . . . .	1
Dumvivaj membroj . . . . .	9
Honoraj membroj . . . . .	2

Entute: 611

Krome pagis 8 kontribuaj membroj.

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu apartenas la klubo. Du honoraj kaj du dumvivaj membroj estis samtempe klubanoj (2 en Oslo, 1 en Skudeneshavn kaj 1 en Trondhejmo). Specifo de la membraro laŭ kategorioj: klubanoj 371 ordinaraj, 17 junulaj, 55 familiaj, 12 junaj familiaj; rektaj membroj 123 ordinaraj, 20 junulaj.

En la klubo en Oslo ekzistas du organizitaj grupoj, junula kaj kabana. Entute la membronombro montras perdon de 2,1 % kompare kun la antaŭa jaro.

## KLUBLABORO

*Superrigardo.* (Ĉar nur 20 el la 22 kluboj ensendis ĉiujn devigajn raportojn, la subaj ciferoj ne estas tute precizaj). — Suma membronombro je la 1/1 1963: 465. Aliĝoj: 32, eksiĝoj: 41. Membronombro je 31/12.: 456. — Okazis 173 klubkunvenoj, meznombro ĉeestis proks. 53 %; estas raportita 100-procenta ĉeesto. — Raportiĝis 46 estrarkunvenoj, 16 festoj, ekskursoj k. t. p. En 6 kluboj laboris 7 studrondoj kun 50 membroj. 6 kluboj raportas pri biblioteko kun sume 195 volumoj. 116 klubanoj posedas elementan ekzamenon — 61 superan, 2 instruitan.

La kluboj kontentige raportadis dum 1963, sed ankaŭ la Estraro zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

*Teatra Sekcio*, gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj kaj membroj, kiuj petis pri tio.

## STUDLABORO

*Kursgvidantoj.* Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1963. Kaj dum la printempa, kaj dum la aŭtuna jarduono en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

*Kursoj.* Per lokaj fortoj okazis 8 kursoj por komencantoj kun sume proks. 70 kursanoj en Halden, Haugesund, Kristiansand, Løten, Skudeneshavn kaj Oslo, parte ĉe «Studenta Libera Instruado». Raportiĝis 1 kurso por progresantoj kun 7 kursanoj en Kristiansand. Fine okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas

ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

*Korespondaj kursoj.* La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de NEL, sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. NEL havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe NEL aliĝis al la unua parto 33 kursanoj (el kiuj 6 en 1 studrondo), al la dua parto 8 kursanoj. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj; 11 lernantoj en la unua parto kaj 1 en la dua estas tiaj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 46 kursanoj (el kiuj 15 en 2 studrondoj), al la dua parto 6 kursanoj (el kiuj 5 en 1 studrondo). — 6 el la kursanoj estas varbitaj de membroj de NEL. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten, L. K. Hunnes kaj M. Tveit, por la junuloj L. Anjer, por «Folkets Brevskole» Ragnv. Rian, por blinduloj H. Kartrud. — La kurso estis anoncita i. a. en la semajna gazeto «Hjemmet» dum la aŭtuno.

*Gaztea kurso* ekaperis en 1963 en «Ryfylke», Sauda.

*Perfektiga studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1963 korektadis taskojn por interesiĝantoj. Vendis kelkaj kajeroj de ekzerctaskaroj. Oni aparte klopodis igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj.* Ordinaraj ekzamenoj okazis en junio kaj en decembro en Oslo. 2 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon, 1 la superan. —

La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vorndal (membroj). Ekzistas 7 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Stavanger, Tromsø, Trondhejmo, Østfold, kaj 6 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

*Stipendioj.* 5 lernantoj ricevis stipendiojn por partopreni la Internacian Someran Kurson en Helsingør.

### INFORMADO

*Informa Fako* (komisiito pri informado: Ludvig Anjer). La komisiito per cirkuleroj kaj leteroj instigis al informada aktiveco. Li redaktis kaj distribuadis la informgazeton «Esperanto-nytt». Li redaktis la proponon de laborplano de NEL, kiun aprobis la landa kunveno.

*La Propaganda Fondaĵo.* La landa kunveno decidis ŝanĝi la statuton de la fondaĵo tiel ke la minimuma kapitalo estu nur kr. 5000. Ĉar la fondaĵo nun posedas la sumon de kr. 5068,07, la minimuma kapitalo estas atingita.

«*Esperanto-nytt*», redaktata de la komisiito pri informado, Ludvig Anjer, aperis per tri 4-paĝaj numeroj, eldonkvanto 15 000. La gazeto iris al personaj abonantoj, al porci-abonantoj kaj al granda nombro da adresoj en senpaga abono, grandparte lernejoj. La gazeto estas financata ĉefe per eksterordinaraj enspezoj.

*Informbroŝuroj.* Oni daŭre uzadis «*Esperanto-nytt*» n-ro 3/1961 (kaj parte ankaŭ aliajn numerojn) kiel ordinaran broŝuron. — La faldfolio «*Velkommen til Esperanto-bevegelsen*» estis disdonata al ĉiuj kursanoj por montri al ili la avantaĝojn de membreco.

*Gazetara Servo*, gvidata de Ludvig Anjer, elsendis al ĉiuj norvegaj jur-

naloj 10 bultenojn kun sume 37 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj; ekde marto ili eliris en ambaŭ oficialaj norvegaj lingvoformoj. La ekspedadon akurate prizorgas s-ino Nanna Fridrichsen. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Arĥivigon konsciencie prizorgas s-ino Ruth Herlofson. Oni registris 421 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo, 157 novaĵojn kaj artikolojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 578 aperigojn (578 ankaŭ en 1962) en 103 gazetoj kaj revuoj (108 en 1962). Atako al Esperanto ne okazis. — La elspezoj por la gazetara laboro estis kr. 1030,90

*Radio* (komisiito R. Bugge-Paulsen). Okazis nur 2 lokaj dissendoj: unu el Stavanger, kie parolis Trygve Müller el Jørpeland, kaj unu el Trondhejmo, kie parolis pluraj klubanoj.

*Interŝtataj organizaĵoj* (komisiito R. Bugge-Paulsen). La komisiito i. a. sendis proteston kontraŭ negativa artikoleto en «*UNESCO-Courier*». Li ankaŭ havis kontakton kun la Edukministerio okaze de raportado pri Esperanto-instruado en Norvegujo.

*Blinduloj.* La komisiito, s-ino Aagot Sletterød, estis malsana dum la plejparto de la jaro. — Kiel antaŭe Esperanto estis devige instruata ĉe la blindullernejo Dalen.

*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, Follidal, serĉas kontakton kun norvegaj esperantistaj skoltoj. Li aperigis artikolojn en skoltaj gazetoj kaj en unu lerneja gazeto en Oslo, kaj per aparta koresponda kURSO instruas al 16 geskoltoj.

*Junularo.* La komisiito, Vidar Vik, serĉis pli bonan kontakton kun niaj junulaj membroj.

*Faksekcio por Instruistoj* estis daŭre gvidata de Th. Sund, Lillestrøm.

*Esperanto en la lernejojn* (prezidanto de la Komisiono por Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). — Oni sendis al Norges Lærerlag informojn por enketo de Internacia Federacio de Instruist-Asocioj pri Esperanto-instruado en la lernejoj. H. Karterud sukcesis konservi la devigan Esperanto-instruadon en la reviziita regularo pri la blindul-lernejo. Astrid Mansrud akiris permeson eksperimenti pri Esperanto en 5a klaso de la lernejo en Bekkelaget en la kadro de la libertempaj okupoj kaj instruas al 15 lernantoj kaj 5 instruistinoj. La landa kunveno akceptis rezolucion al ĉiuj norvegaj esperantistaj instruistoj kaj lektoroj klopodi por ekhavi permeson entrepreni en siaj lernejoj eksperimentan instruadon de Esperanto, similan al tiu, kiun efektivigis J. H. Rosbach kaj C. Støp-Bowitz. La rezolucia teksto kun komentarioj kaj klarigoj estis sendata al ĉiuj esperantistaj instruistoj kaj lektoroj, sed ĝis nun sen multe da reeĥo.

*Informaj prelegoj.* Raportiĝis nur 1 informa prelego en Oslo kun proks. 100 aŭskultintoj; kredeble okazis informprelegoj, pri kiuj oni forgesis raportoj.

*Nordlanda Esperanto-Komitato* (reprezentanto de NEL: C. Støp-Bowitz). La komitato ne montris aktivecon.

### DIVERSAĴOJ

*Norvega Esperantisto.* — Aperis 5 ordinaraj numeroj 16-paĝaj kaj unu 8-paĝa, kaj 2 duoblaj numeroj respektive 24- kaj 16-paĝa, sume 128 paĝoj. — La enspezoj per kotizoj kaj anoncoj ne permesis eldonon de 10 plneaj 16-paĝaj numeroj. — La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, kaj Hans Amund Rosbach, Follidal, kun la unua kiel ĉefredaktoro. La ekspedadon tre akurate prizorgis Tharald

Dybing, kiu aranĝas ankaŭ pri la adres-stenciloj. La abonkotizo estis kr. 8,00. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj kiel en 1962, sed aldoniĝis mallongaj novaĵoj en norvega lingvo. Laŭ deziro de la landa kunveno oni faris enketon inter la membroj pri la enhavo de la gazeto.

«*Pro Merito*». Ordena promocio okazis dum la landa kunveno. Estis nomataj 4 novaj ordenanoj, Kavaliroj de la 2a klaso: Trygve Kvalvåg, Lars Kåre Hunnes, Johannes Jahren kaj Nanna Fridrichsen. La ordeno ricevis ordenajn robojn kaj ceteran ekipaĵon faritajn de Eva Støp-Bowitz.

*Biblioteko.* La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de NEL, la ceteraj estas sekure magazinitaj. La kresko de la biblioteko ĉefe rezultis el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj intersange kun ĝi.

*Bibliografio.* Ciklostilita eldono de la bibliografio pri norvega literaturo tradukita en Esperanton, verkita de Lars Kåre Hunnes, estas en preparo.

*Norvega-Esperanta vortaro* fine aperis ĝis la landa kunveno kaj estas vigle vendata.

*Filmo «Bonvenon al Oslo».* Kopioj de la filmo daŭre cirkuladas en la mondo.

*Turisma Servo de NEL*, sub gvidado de Vidar Vik, peris aliĝojn kaj informojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Sofio kaj aranĝis aviadilan karavanon. Aŭtune la Turisma Servo, sub provizora gvidado de la Estraro per la prezidanto, dissendis cirkuleron pri la 49. Universala Kongreso en Hago.

*Internacia organizo.* La kunlaboro kun UEA estis bona. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Ko-



mitatano A de NEL: Ludvig Anjer. C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. Anjer partoprenis la Komitat-kunidojn dum la kongreso en Sofio. — En 1963 estis 69 delegitoj en 28 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de UEA estis 123. En la konkurso de UEA Norvegujo atingis la 12an lokon kun 100 %.

*Nobel-premio de paco al UEA.* La propono pri UEA kiel kandidato estas ripetita por 1964.

*48a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Sofio. Aliĝis proks. 18 norvegoj, sed ne ĉiuj ĉeestis. La norvega registaro ne estis reprezentata, NEL.n reprezentis Astrid Mansrud.

*Kartoteko pri norvegaj esperantistoj.* La kartoteko enhavas nun 9143 kartojn pri esperantistoj en 686 lokoj.

*Korespondaj statistiko.* NEL kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1436

leterojn kaj 1237 presaĵojn kaj sendis 1334 leterojn kaj 3210 presaĵojn.

*La intereso pri Esperanto* ŝajnas ne malkontentiga, se oni juĝu laŭ la demandoj pri Esperanto k.t.p., kiujn ricevas la oficejo de NEL. Al tio ĉefe kontribuis i.a. «Esperanto-nytt». Nia «sistema varbado» estas regule aplikata al ĉiuj interesiĝantoj. La gazetaro kontentige publikigadis pri Esperanto.

*Konkludo.* Ankaŭ 1963 ni devas noti malgrandan malkreskon de la membraro. La nombro da ekziĝoj ne estis aparte granda, sed evidente la kursagado kaj membrovarbado de la kluboj ne estas sufiĉe forta por kompensi la naturan perdaton. Ĉiu klubo kaj ĉiu unuopa membro devas daŭre ĝis maksimumo streĉi siajn fortojn por krei novajn esperantistojn, starigante kursojn, varbante anojn por la korespondaj kursoj ktp., kaj antaŭ ĉio por membrigo de la novaj adeptoj.

Oslo, 31/12 1963 — 18/3 1964.

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

C. Støp-Bowitz Ludvig Anjer Tom Arbo Høeg Signe Haug

Karl Ekhaugen Olav Rygg Jan Ekhaugen

Kion signifas **rezino**? — Kiel diri en Esperanto **lyngmark**?

Se vi ne scias, uzu:

Ragnv. Rian: **Esperanto-Norsk ordbok**

174 paĝoj. — Prezo: Kr. 16,00 plus afranko.

kaj Ragnv. Rian,

E. A. Haugen: **Norsk-Esperanto ordbok**

374 paĝoj. — Prezo: Kr. 25,00 plus afranko.

Boks 942, Oslo ELDONEJO ESPERANTO A/S Poŝtĝiro 100 31

La kalkuloj de Norvega Esperantista Ligo

SPEZOJ 1963

<b>Enspezoj:</b>		
Klubkotizoj .....		2 170,00
Rektaj membroj .....		1 360,00
Rentumoj .....		257,83
«Esperanto-nytt» .....		1 314,50
<b>Elspezoj:</b>		
Kostoj .....	1 833,24	
Afranko .....	792,85	
Gazetara Servo .....	1 030,90	
Kotizoj al U.E.A. ....	390,00	
Kotizoj al la Distriktoj .....	204,00	
Norvega Esperantisto .....	1962: 67,02	
	1963: 277,81	
	210,79	
Kovrita de la Kontorfondaĵo .....	210,79	
		0,00
«Esperanto-nytt» .....		1 314,50
		5 565,49
Elspezoj kovritaj de la Kontorfondaĵo .....		463,16
		5 102,33
		5 102,33

BILANCO je 31/12 1963

<b>Aktivajoj:</b>		
En la kaso .....	73,17	
Poŝtĝirokonto 100.30 .....	1 540,03	
Meblaro .....	602,88	
«Pro Merito» .....	118,59	
«Faktoj pri Norvegujo» .....	15,75	
Akcioj en Esperantoforlaget A/S .....	5 346,00	
«Kulepennen» .....	74,00	
<b>Debitoroj:</b>		
Andresens Bank A/S .....	10 846,84	
Oslo Sparebank .....	5 068,07	
Div. debitoroj .....	1 660,82	
		17 575,73
<b>Pasivajoj:</b>		
Div. kreditoroj .....		4 127,46
La Kontorfondaĵo .....		3 000,08
Loterio .....		3 082,65
Studfondaĵo .....		1 024,85
Garantifondaĵo dumvivaj membroj .....		617,00
Konservataj klubkasoj .....		325,02
La Propaganda Fondaĵo .....		5 068,07
La «Jubilea Kaso 1961» .....		172,50
La Kontorfondaĵo .....		210,79
La Kontorfondaĵo .....		463,16
Kapitalo .....		7 254,57
		25 346,15
		25 346,15

Oslo, la 31an de decembro 1963 / la 18an de marto 1964.

Karl Ekhaugen  
Kasisto

Bjørn Ottesen  
Revizoro

## La Korespondaj Kursoj (Aveling for Brevundervisning)

SPEZOJ 1963

<b>Enspezoj:</b>		
Venditaj studletoj .....		911,00
Rentumoj .....		132,00
<b>Elspezoj:</b>		
Kostoj .....	642,95	
Afranko .....	132,40	
Studmaterialoj uzitaj .....	260,00	
Al la kapitalo .....	7,65	
	1 043,00	1 043,00

BILANCO je 31/12 1963

<b>Aktivaĵoj:</b>		
En la kaso .....	29,19	
En la poŝtĝira konto .....	3 177,93	
En la Poŝta ŝparkaso .....	2 207,00	
Studmaterialo .....	4 740,00	
<b>Pasivaĵoj:</b>		
Kapital-konto .....		10 154,12
	10 154,12	10 154,12

La kalkuloj estas reviziitaj kaj trovitaj en ordo.

*Eilif Schei*  
Revizoro

*Else-Margrethe Müller*  
Kasistino

## J. H. Rosbach en lernejoj en Bergen

La studenta Esperanto-societo en Bergen kun apogo de Bergens Esperantoklubb kaj NEL dum la tagoj 23.—26. febr. 1964 aranĝis turneon kun lektoro J. H. Rosbach el Sarpsborg ĉefparte en mezgradaj lernejoj en Bergen kaj ĉirkaŭaĵo. De la lernejestroj ni atingis permeson prezenti nian aferon dum ordinaraj instruhoroj. Estis dum sia vintra ferio ke Rosbach havis okazon veni. Bedaŭrinde ankaŭ la plejmultaj gimnazioj en Bergen dum tiu tempo vintroferiadis. Lektoro Rosbach tre taŭge pa-

roladis. Lia kvazaŭ sencela prezentmaniero tre impresis. Ŝajnis ke li parolis nur pro emo kaj gajo. Entute aŭskultis 760 lerneĵanoj, ni vendis 490 maŝlosilojn kaj 75 anoncis sin al kurso. Sinsekve ni tre ĝojis pri la rezultoj. Ni sentis ke Esperanto povas progresi tiom amplekse kiom ni mem deziras tiel longatempe kiel la lektoro estas tiel petola. Tiu persono nur devus prelegi pri Esperanto, oni diris.

Ni startis kvar kursojn. S.ino Doris Birkelund gvidis unu por junullerneĵanoj, Arnljot Kyllingstad tri kurs-

ojn ĉefe por gimnazianoj. La defalado tuj montriĝis. Niaj kursoj prizorgis 73 el la anoncintaj lerneĵanoj. La unuan fojon aperis nur 37, la duan 25, la trian 11. Mi tuj atentigas pri du tre malfavoraj cirkonstancoj. Inter la prelego kaj la unua fojo okazigis por la plejmulto vintra ferio, inter la dua kaj tria fojo situis paskferio, kaj tiu lasta forprenis du instruvesperojn. Nun nur daŭriĝas kurso ĉe Laksevåg mezgrada lernejo. Ni tamen esperas ke la restantaj kursanoj tie kune kun unuopuloj kun kiuj ni ekhavis kontakton dum la kampanjo, reprezentas kernon por kiu nia studenta societo multe klopodas fari. La pasintan dimanĉon ni aranĝis skiekskurson por sep el ili. Kaj baldaŭ ni prezentos aron da projektoj al la rektoro en Laksevåg, por ke li aprobu. Entute gravas konservi la bonvolon de la rektoroj kaj la intereson precipe de la kontaktuloj inter la lerneĵanoj. Inter la aluditaj projektoj mi mencias: 1) Plantekskurso en kiu jam promesis fakulo ĉe la universitato partopreni. 2) Aranĝo kun baladodanco kaj aliaj elektitaj malnovaj dancoj. «Leikarringen» en «Ervingen» certe helpos aranĝi tion. 3) Geografiaj programoj pri certaj aktualaj landoj — entenontaj divenkonkursojn. En «la geografia kadro» de la Esperanto-movado en Bergen ni jam havas ĝermojn al nederlanda, hispana, ĉeĥoslovaka, jugoslavia kaj greka sekcioj. 4) Venontjare ni preskaŭ certe povos oferti paskferirestadon por kelkaj en someropaŝteja dometo sur Hardangervidda. 5) Ni ofertos al rektoro Joel Vilkki, Somero, aranĝi restadon ĉi-somere por finnaj gimnazianoj.

Cetere invitos ilin la urba klubo al junularkunveno la 23an de aprilo.

La vesperoj dum la restado de Rosbach estas ankoraŭ ne menciitaj. Li venis al Bergen la dimanĉon ma-

tene. Dum la vespero li programis en Bergens Esperantoklubb. Oni konstatis ke Esperanto povas esti tre eleganta lingvo. La vesperon lunde li parolis en gimnazia societo. Bedaŭrinde la kunveno estis malbone konigita, sed 88% de la ĉeestantoj anoncis sin al kurso. La vesperon de mardo la kunveno estis en studenta medio. Unu el la membroj de nia societo, lerta lingvisto kaj interalie kunlaboranto en la vortlibro de Hellevik, faris, kion Rosbach nomis la solan saĝan rimarkon kontraŭ Esperanto nome ke ĝi estas hindoeŭropa lingvo kaj do ne sufiĉe internacia lingvo. Tamen Rosbach respondis ke tio ĝustas, kiam temas pri vortorigino kaj gramatiko, sed en la vortfarado Esperanto similas al ekz. la turka, la korea kaj la svahila. La 14 ĉeestantoj sidis ĝis la domestro forpelis nin.

Kion instruas al ni la eksperimento? Laŭ mia opinio ni estas trovintaj taŭgan progresmanieron inter mezgradaj lerneĵanoj, precipe inter gimnazianoj, la parto de la junularo kiu plej decide formos la estontecon. Sed nia aranĝo ankaŭ montras gravajn jam aluditajn erarojn. Ni jam nun tre deziras ke Rosbach baldaŭ revenu. Kaj ni admonas la lektoron pripensi ĉu estas entute eble, havigi al si en januaro 1965 liberajn lundon kaj mardon, ĉu ne ekzistas en tuta Sarpoburgo simpatia anstataŭanto al kiu li malenvias la gajnon de lia salajro dum du tagoj! Se tio, ni povos refari la entreprenon sub multege pli favoraj cirkonstancoj. Unue la elekto inter gimnazioj fariĝos multe pli granda, due la studsezono pli longa kaj antaŭ ĉio pli trankvila, kaj ne forgesu pli longan skisezonon.

*Arnljot Kyllingstad.*

## Konkurso «Arbo»

Nia konkurso «Arbo» ricevis kontribuaĵojn el tri landoj. Nur la branĉoj Originala poezio, Tradukita poezio kaj Foto kolora estas reprezentitaj. En la branĉo Originala poezio oni ne aljuĝis premion.

La branĉon Tradukita poezio gajnis *Henry Fridén*, Halden per sia traduko de «Træet» de Bjørnstjerne Bjørnson. Honoran mencion ricevis por «L'Arbe» de Victor Hugo *Rudolf Dreyer*, Oslo.

La branĉon Foto kolora gajnis *Leif Sandberg*, Oslo, per sia foto «La aĝa majstro».

Sinjoroj Fridén kaj Sandberg ricevos kiel premion unu jarabonon al «Norda Prismo».

Ni kore dankas pro la intereso pri la konkurso.

\*

## LA ARBO

(Træet)

de Bjørnstjerne Bjørnson

Pretis la arbo, burĝon' kaj foli'.  
«Ĉu mi prenu?» ekblovigis la frosto sur ĝi.

«Ne, lasu ilin nur,  
ĝis floroj sidas sur!»

Kaj tremis la arbo de pint' ĝis tali'.

Kreskis la flor' dum bird-trila torent'.  
«Ĉu mi prenu?» ventolis kaj svingis la vent'.

«Ne, lasu ĝin nur,  
ĝis beroj sidas sur!» —

petegis la arb' kun terura tim-sent'.

La arb' havis berojn sub suna inond'.  
«Ĉu mi prenu?» san-ruĝa knabino sur grund'.

«Jes, via akir'  
laŭ em' kaj dezir'!»

Ĝi diris kaj tentis per branĉa abund'.

Trad.: H. Fridén.

## POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

(daŭr. de p. 42)

Vortoj:

ono — brøkdæl  
menso — hjerne  
regi — styre, beherske  
reciproki — gjengjelde  
fiksita esprimo — spent uttrykk  
progresi — gjøre framskritt  
malbutonumi — knappe opp  
peni — anstrengelse seg for  
severa — streng  
sen plua vorto — uten å si mer  
fasko — bunt, knippe  
en-man-igi — overrekke  
rekompenci — belønne  
ekscii — få vite  
indigena kutimo — innfødt sedvane  
skikk  
avide — begjærlig  
se mi estus kompreninta, mi sciis —  
om jeg hadde forstått, ville jeg ha  
visst...

## PETU PROSPEKTON PRI



ĈE I.T.C. - GEB. 114  
SCHIPHOL NEDERLAND

## 49-a Universala Kongreso de Esperanto

DEN HAAG, 1.—8. Aŭgusto 1964

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

### TRE GRAVE

Pro kaŭzoj ekster la povo de la Loĝiga Servo la limdato por sendo de mendoj por loĝado en Den Haag dum la kongresa semajno estas plifruigita al la 15-a de majo 1964. Post tiu dato la Loĝiga Servo absolute ne plu povas prizorgi mendojn kaj la malfruigintoj devos mem aranĝi sian loĝadon.

Ni do varme konsilas al ĉiuj interesiĝintoj sendi sian mendon kiel eble plej baldaŭ, ĉiukaze antaŭ la menciita dato.

### SENPAGAJ LOĜEJOJ

La Loĝiga Servo daŭre ricevas petojn por senpagaj loĝejoj en Den Haag. Ni devas informi ke bedaŭrinde ne ekzistas por la Loĝiga Servo la ebleco plenumi tiujn petojn kaj sekve oni ne plu skribu tiusence.

### I. S. U.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato okazos prelegoj de Prof. D-ro Sin'itirô Kawamura, Prof D-ro Ivo Lapenna, Prof. D-ro Oton Pancer, Prof. Inĝ. Vasil Peevski, Prof. Bozidar Popović, Prof. Juan Regulo Perez, Prof. Gaston Waringhien, S-ro John Wells.

### STATISTIKO

(ĝis 24/3 1964). Alĝerio 2, Argentino 3, Aŭstralio 6, Aŭstrujo 18, Belgujo 28, Brazilo 2, Britujo 179, Bulgarujo 326, Centra Afrika Resp. 1, Ĉeĥoslovakujo 10, Ĉilio 1, Danlando 35, Finnlando 29, Francujo 198, Germanujo 142, Hindujo 2, Hispanujo 14, Hun-

garujo 91, Indonezio 1, Israelo 3; Italujo 68, Japanujo 7, Jugoslavio 67; Kuvajto 1, Luksemburgo 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 303, Norvegujo 12, Nov-Zelando 4, Pollando 131, Portugalujo 2, Sovetunio 2, Svedujo 80, Svisujo 23, Usono 16, Venezuelo 2. — Entute 1817 el 38 landoj (pasintjare 1935 el 36 landoj).

## 20-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O.

Anne Frank Domo, Amsterdam,  
8.—15. aŭgusto 1964

«Paroli estas arĝento, silenti oro». tiel juĝas Nederlanda proverbo. Por stimuli la produktadon de arĝento (necesa por pliaj pokaloj «Ivo Lapenna») ni anoncas ĉi-pere la temojn de la

### ORATORA KONKURSO

1. TEJO dudekkvinjara.
2. La Taglibro de Anne Frank, kiel ĝi al mi impresis.
3. Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj?
4. Ĉu eniru la lernejojn nova instru-temo: «La Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj»?
5. Kion mi *ne* ŝatas pri Nederlando.

Eble vi pensas, ke oratoranto pro sia ora torento (de vortoj) estas alĥemista amatoro. Sed laŭ la proverbo, ĝuste la aŭskultado valoras. Tiun oran virton ekzercigos al vi du altnivelaj oficialaj

### PRELEGOJ

— «Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj?» de mag. G.H. Slotemaker de Bruine, parlamentano, prezidanto de la Pacifista Socialista Partio de Nederlando, ĉefestrarano de la Unuiĝo de Mondfederalistoj; kaj: — simpozieto pri Afriko, konsistanta

**Norvega Kroniko**

Red.: Karsten Langsholt

## GENERALAJ KUNVENOJ

*Klubo Esperantista en Oslo.*

5/3. La prez. Kirsten Ek malfermis la kunvenon kaj tuj transiris al la tagordo de la ĝenerala kunsido:

*Elektaj:* Prezid.: John Berggreen (nova); vicprez.: Otto Prytz (nova); sekr. korespondanta: Aslaug Refsing (nova); sekr. raportanta: Harda Danielsen (reel.); kasisto: Otto Koren (reel.); estraranoj: Brynhild Østmo (reel.), Ellen Tangen (nova); anstataŭantoj: Tor Magnus Carlsen (nova), Kirsten Ek (nova).

*Eventualaĵoj:* Else Bugge-Paulsen proponis ke oni pripensu aranĝon de «pulo-foiro» por plibonigo de la ekonomio de nia klubo.

La nova prezidanto John Berggreen transprenis la kluban martelon kaj dankis la elirantajn membrojn de la estraro kaj donis florbukedon al la prezidinto Kirsten Ek. Ŝi esprimis sian dankon al la malnova estraro por bona kunlaboro.

Sekvis «Popolmuzika rondvojaĝo kun divenkonkurso». Per sonbendo Otto Prytz ludis melodiojn el 11 diversaj landoj. La lasta melodio «Hejmeca

el prelego, diskuto, ekspozicio aranĝataj de la «Centro de Esploroj pri Afriko» de Pola Esp. Junularo, kaj prelego: «La grupo de junaj Nederlandanoj dum la unua jaro 1963—1964 de sia helpkampanjo en Kamerun», de ing. W. H. Dijkstra, ĉef-estrarano de la Nederlanda Kristana Unuiĝo de Kamparaj Gejunuloj.

Ambaŭ Nederlandaj prelegantoj lernas Esperanton speciale por siaj prelegoj, malgraŭ densa profesia okupiĝo!

Fantazio» estis norvega komponita de juna membro de nia klubo, Gunleik Bergrud. La solaj kiuj havis 11 korektajn respondojn, estis John Berggreen kaj R. Bugge-Paulsen. Kafo-paŭzo kiel kutime. Libro vendiĝis por kr. 115,—. Ĉeestis 35 personoj.

*Kristiansands Esperantoklubb*

22/2. Ĉeestis 11 malnovaj membroj, 3 novaj kaj 5 gastoj.

La prez., s.ino Bergljot Vik, malfermis kaj gvidis la kunvenon. — La sekretario Helge Grøntoft legis la jarraporton, kiu estis aprobita sen rimarkigoj. Ĉar la kasisto pro mal-sano ne ĉeestis, la sekretario legis ankaŭ la bilancon, kiu same estis aprobita.

La elektaj donis jenan rezulton: Prezidanto: Bergljot Vik; vicprezidanto: John Vagle; sekretario: Helge Grøntoft; kasisto: Beth Hveem; estrarano: Birger Reinertsen; anstataŭantoj: Karina Vagle, Maria Hauge (nova).

Post la jarkunveno okazis grandioza festo. Ørn Karlsen paroladis pri Zamenhof. Westerlund parolis por la sinjorinoj, kaj Maria Hauge parolis por la viroj. Sekvis diversaj distraĵoj kaj fine oni dancis ĝis malfrue en la nokto.

*La Granda Ideo, Skudeneshavn,*

okazigis sian jarkunvenon la 17/1 en la ĉarma hejmo de gesinjoroj Chris. Hanson. 80% de la klubanoj kunvenis, do ok anoj krom kelkaj geedzoj. La prezidanto deziris al ni bonvenon al sia hejmo, kaj poste ni gaje kantis «El ĉiuj landoj plej amas ni — —»

La sekretario donis mallongan jarraporton kaj legis raportojn.

Elektaj. Kiel estraro estis elektataj: Chris. Hanson, prezid.; John Hellesland, vicprez.; Didrik Mjøllhus, sekr.; John Blixhavn, kasisto; Bjørg Torkelsen, estrarano; Ragnhild Høines,

revizoro. — Didrik Mjøllhus, delegito; Ole Sandslett, vicdelegito de UEA.

Kafo-paŭzo kun bela manĝotablo en la gastĉambreto, tre vigla babilado kaj manĝado. — Poste bela muziko de Hellesland. En bona atmosfero oni disiris je la 23a horo.

## FESTKUNVENO

*Grupo Esperantista de Trondheim*

festkunvenis 11/2 por honoro s-ro Ragnvald Rian, kiu antaŭe ricevis la Grandan Krucon de PRO MERITO. Post la kantado de n-ro 4 «La vojo» ni ĝuis kafon, buterpanojn kaj molajn kukojn. Dum la manĝado s-ro Nordstrand parolis pri s-ro Rian kaj lia granda laboro por la Esperantomovado. Rian esperantistiĝis jam en 1906, kaj lia senlaca laboro i. a. rezultigis 2 vortarojn norveg-esperantajn, 1 vortaron esperant-norvegan kaj 1 leterkurson (en 1923). Rian fariĝis honora membro de UEA en 1948, de NEL en 1949 kaj de GET en 1952. S-ro Rian dankis pri la belaj vortoj, kaj post tio slojdinstruisto R. Andersen prezentis 2 interesajn kaj belajn filmojn pri vojaĝoj tra Norvegujo kaj Danujo.

## ORDINARAJ KUNVENOJ

*Klubo Esperantista en Oslo.*

16/3. La nova prez. John Berggreen bonvenigis kaj dankis al Emmy Henriksen ĉar ŝi afable gastigas nian klubon. La sekretario legis la raporton pri la lasta klubkunveno. Ĝi estis aprobita post unu informo. — Otto Prytz prezentis amuzan ĉapitron de «Ni en Skandinavio» de Willy Breinholst. — Inter la eroj de la programo ni kantis la Kluban Marŝon kaj la Bosko Fraksena. — Støp-Bowitz kaj John Berggreen donis kelkajn informojn. — La lasta punkto de la programo estis la familia ludo «Mia

ŝipo estas ŝarĝita per...». — La 28 ĉeestantoj tre ĝuis la kafon, kukojn kaj babiladon en la hejmeca atmosfero. Libro vendiĝis por kr. 26,—.

*Grupo Esperantista, Trondheim.*

25/2. La kunveno okazis en la hejmo de ges-roj Bjørgum. Ni kantis la unuan strofon de «Min sjel lov Herren», kaj post tio ni ĝuis bonegan manĝaĵon. Post kelkaj klubaj aferoj s-ro Karterud informis pri letero de s-ro L. Friis en Danujo. S-ro Friis nun kompilas rakontojn kaj anekdotojn pri esperantistoj. S-ro Næss diris, ke nia Esperanta gazetkurso verŝajne aperos en ĉiuj nordaj gazetoj por abstinentaj fervojistoj. Post tio s-ro Bjørgum prezentis belegajn kolor-lumbildojn el Jerusalemo kaj el la santal-misiaj laborkampoj en Hindujo.

*«La Granda Ideo», Skudeneshavn.*

26/2 okazis la dua kunveno en la Nova jaro en Mjøllhus, la vilaĝo kiu situas kelkajn kilometrojn for de Skudeneshavn. — Tamen sep gastoj alvenis. La gastoj kaj la gastigantoj ĝuis la bonan esperantan atmosferon kiel kutime. — Post la bona kafo-paŭzo oni fervore ekzercis en Esperanto, per tralego kaj traduko de kelkaj artikol(et)oj el «Norvega Esperantisto». — Je la deka kaj duono la aŭtomobilo staris ĉe la domo, kaj la kunveno devis finiĝi.

**Korespondu!**

Nova esp.isto 35jara, Stefan Stojanof, Kapitan Nicola 40, Gabrovo, Bulgarujo, dez. kor.

Amikan korespondadon kun gesam-ideanoj en Oslo aŭ aliaj partoj de Norvegujo serĉas s.ino Heleno Acs, II., Mártirok u. 27. V. 14, Budapest, Hungarujo.



53, *Rostov-Don* 38, U.S.S.R., deziras multajn korespondantojn en Norv.

46-jara teknika oficisto s.ro Tibor Németh, XII Bazin u. 14, *Budapest*, Hungarujo, deziras kor., interŝ. poŝtmarkojn, bildkartojn, il. gazetojn.

Mi deziras kor. pri diversaj temoj, interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, Esp. glumarkojn kaj gazetojn. Respondo garantiata. Ludvik Zelezný, *Havlíčkův Brod*, Ledečská ul. 716, Ĉeĥoslovakio.

Pola inĝeniero dez. kor. Miaj intereso: turismo, filatelo kaj inĝenieraj aferoj. Boguslaw Szuba, ul. Lilpopa Nr. 36 m. 4, *Brwinów*, Polujo.

S-ro Ivan Šavkun, *Gorkij*—41, ul. Ognorskogo 23—7, U.S.S.R. kaj lia amikoj deziras interŝanĝi leterojn, poŝtkartojn kaj p.m. kun tuta mondo.

Dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn: S.ro Momčilo Ćivović, *Čurug*, Jugoslavio.

## Korespondu!

Bibliotekistino 32-jara deziras kor. kun norvega esperantisto. Intereso: belarto, filmoj, vivo de via popolo, familia vivo k.t.p. Mi ne estas filatelistino. F.ino Maria Nedelčeva Koleva, kv. Tolbuĥin, bl. 5, vh. A, ap. 9 — *Dimitrovgrad*, Bulgarujo.

S.ro Adolf Stanura, Ĉkalovstr. 863, *Ostrava 8 Poruba*, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝanĝi publikaĵojn kaj informojn pri eventoj en stenografio kaj tajpado en Norvegujo kaj aliaj landoj. Speciale bonvenaj estas informoj pri aktualaj konkursoj, novaj libroj k. s. en tiuj fakoj. Tiaj informoj estos uzataj por ĉeĥaj revuoj kaj la nomo de la informanto estos indikita, ankaŭ la fakto, ke la informo venis per Esperanto. Validas ĉiam.

43 gejunuloj 11—38-jaraj dez. kor. kun genorvegoj. Skribu al: Esperantista Junularo, Instituto Barcelos Domingos, Rua Gianerini 25 — *Campo Grande*, Guanabara, Rio de Janeiro, Brazilo.

33-jara kimra edzo dez. kor. kun norvegoj. Intereso: literaturo, ekonomio, politiko, ilustr. gazetoj, poŝtmarkoj pri eminentuloj. S.ro Dufydd Dafis, 13c Alfred St., *Maesteg*, Morgannwg, Kimrujo (Wales), Britujo.

S.ro Talazac Jean, *Monbrun*, Gers, Francujo, dez. kor.

45-jara oficistino, Anna Bonta, Váci-út. 58, *Budapest XIII*, dez. kor.

S.ro Jozefo Mikulas, instruisto, *Hoďáz*, Hungarujo, dez. kor. kun instruisto aŭ instruistino.

Rostova Esperanto-Klubo, s.ro Viktor Gruško, Prospekt Lenina 95, kv.

## Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo  
Telefon: 42 47 79  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo*: Boks 942, Oslo.  
Postgiro 100.32

## Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo  
Telefon: 42 47 79

## Cefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

## La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:  
Johan Hammond Rosbach,  
C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun  
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.  
Telefona: 54 7 27